# alfabeto kaj prononco

La alfabeto enhavas 36 literojn. La norma sekvenco alfabeta estas:

a å æ b c ɔ d ð e f g h ħ i ι j ʒ k l m n ŋ o ø p q r s t u ů v w x y z

Jen la sonoj de la literoj, per la Internacia Fonetika Alfabeto.

• Oftaj vokaloj:

| | |
|---|---|
| a | varias de [a] al [ɑ] |
| i | [i] |
| o | [o] |
| u | [u] |
| e | Antaŭ konsonanto: [ɛ] kiel e en la Esperanta vorto “sen”, germana “Set.”<br>Ĉe la fino de vorto, aŭ antaŭ vokalo: [eː] kiel ee en la germana “See.” |

• Maloftaj vokaloj:

| | |
|---|---|
| æ | [æ] kiel a en la angla “fat” |
| å | [ɔ] kiel aw en nordorienta usona “lawn” |
| ι | [ɪ] kiel i en la angla “stick” |
| ø | [ø] kiel ö en la germana “nötig” |
| ů | [ʊ] kiel oo en la angla “book” |
| x | [ə] aŭ [ʌ] aŭdebla en la angla “cut” kaj “Bubba” |
| y | [y] kiel ü en la germana “über” |

• Konsonantoj:

| | |
|---|---|
| p | ofte aspiracia [$p^h$] en komenco de silabo; aliloke [p] |
| b | [b] |
| | |
| t | ofte aspiracia [$t^h$] en komenco de silabo; aliloke [t] |
| d | [d] |
| ð | [ð] aŭ [θ] (en senregula alofona variado) |
| | |
| k | ofte aspiracia [$k^h$] en komenco de silabo; aliloke [k] |
| g | [g] |
| ħ | [x] kiel la ĥ de Esperanto |
| q | [ʔ] glota halto |

m [m]
n [n]
ŋ [ŋ] kiel ng en la angla “sing”

f [f] aŭ [ɸ] (varias de unu al alia parolanto)
v [v] aŭ [β] (varias de unu al alia parolanto)

s [s]
z [z]

ɔ [ ʧ ] kiel la ĉ de Esperanto
c [ ʃ ] kiel ŝ en Esperanto
ʒ [ʒ] voĉa palato-alveolaro, kiel ĵ en Esperanto

l [l]
r Varias de unu al alia parolanto. La uvula trilo [ʀ] estas plej ĝusta.
Ankaŭ permeseblas la uvulara frikativo [ʁ] kaj la alproksimanto “r” [ ɹ̠ ].

• Tri literoj povas aperi nur en la komenco de silabo:

h [h] kiel h en Esperanto, glota frikativo aŭ ‘glota transiro’
j [ j ] kiel la j de Esperanto
w [w] kiel la w en la angla “water” (mallonga u kun lipoj preskaŭ
en pozicio por produkti “b”)

• Digrafoj por diftongoj:

ai [aɪ] simila al aj en Esperanto
au [aʊ] simila al aŭ en Esperanto

• Variantoj de literoj:

En manskribo oni uzas literon simila al ẟ (Unikodo U+1E9F) anstataŭ ð aŭ đ, kaj literojn simila al ʅ (U+0285) aŭ ƨ (U+01A8) anstataŭ c.

Manskribe oni uzas ꜧ (U+A727) anstataŭ ħ. Kutime ꜧ kaj ŋ havas dekstruman lopon en descendparto. Unikodo ne havas apartajn kodpunktojn por la ĝustaj (kunlopaj) signoj.

Anstataŭaĵoj por fremdaj poŝtelefonoj kaj primitivaj komputiloj:
æ→à, å→á, ɩ→í, ø→ó, ů→ú, ɔ→ć, c→ś, ʒ→ź, ŋ→ñ

Por antikvaj tajpiloj:
æ→@, å→8, ɔ→¢, ʒ→3, ŋ→9

- Akcento

Unusilabaĵoj havas akcenton laŭ cirkonstanco.

Pri plursilabaj vortoj estas kvar reguloj:
1. Se la vorto finiĝas per vokalo, la akcento estas sur la antaŭlasta silabo.
2. Se la vorto finiĝas per konsonanto, la lasta silabo ricevas la akcenton, tamen…
3. La akcento de la substantivo ne ŝanĝiĝas kiam ĝi akiras la singularan sufikson aŭ la pluralan.
4. Se la *radiko* finiĝas per speciala silabo kiel **-um** aŭ **-us**, la antaŭlasta silabo *de la radiko* ricevas la akcenton.

- Diversaĵoj:

1: Malofte ni vidas la jenajn literojn en tekstoj: ɛ, ɬ, ɣ.
2. Nek daŭro de vokalo nek tono estas fonema en la lingvo.
3. Sola konsonanto (sen vokalo) povas esti kompleta silabo, ekzemple la prefikso **m**.

- Interpunkcio:

| | |
|---|---|
| . ? ! | Punkto aŭ demandosigno aŭ kri-signo indikas finon de frazo. |
| [ ] | Rektaj krampoj estas la citilojn. |
| · | Meza punkto `U+00B7` estas decimala markilo: π ≅ 3·14159 |

- Majusklo:

La lingvo <u>ne</u> uzas majusklon ĉe komenco de frazo. Majuskloj indikas nomojn de homoj kaj lokoj. La majusklo restas en derivitaj adjektivoj.